# BONA ESPERO

**Cirkulero 60**
**por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r.a.**
prezidanto: Otto Nelken,
Hirschfeldstr. 6, D-59581 Warstein, ☏ 02902-57460
u.nelken@t-online.de

Warstein, 2003-06-03

Karaj geamikoj,

ĉiujn pro la plimalfruo de la kutima „ paska sciigo " malkvietaj legantoj mi ŝatas informi, ke mi tiucele de pli bona tempa ekvilibro inter la ambaŭ rondleteroj kaj same favore al pli elpezita informo ankaŭ estonte planas sendi nur je Pentekosto al vi la unuan leteron. – Sed de ĉi tiu relative malgrava novaĵo al vere fundamenta reformo ĉe Bona Espero. Legu ĉirilate denove unue la skribaĵon de Ursula pri:
„**Historia asembleo** en Bona Espero
La 5-an de aprilo 2003 kunvenis en Bona Espero la kompleta Estraro (5 direktoroj kaj 2 kont-revizoroj) , 5 bonesperanoj kaj 5 volontuloj, nome la estraro: Enivaldo Alves Silva (ĝenerala direktoro), Giuseppe Grattapaglia (financoj), Moacir Eustaquio da Silva (administrado), Ursula Grattapaglia (edukado kaj sociaj servoj), Ines Nunes de Andrade (fondintino, registaraj rilatoj), Mario Garofalo kaj Lia Milhomem Moreno (kont-revizoroj).
Bonesperanoj : Adarci Ferreira de Sousa, Gloria Barreto, Alvaro Lombardi, Ady Melo Costa, Clarimundo José Barbosa (Tota).
Volontuloj: Orlando Neres Santiago, Adelí Pereira de Castro, Leslie Rodrighiero, Mauro, Jaqueline kaj Marcos Froemming.

Antaŭ la malfermo de la asembleo, kunsidis la 5 estraranoj por pridiskuti la tekston de Interna Regularo, kiu difinu la diversajn aspektojn kaj taskojn de Bona Espero, ne detale priskribitajn en la Statuto. Tiu regularo montriĝis tre necesa antaŭ la plinombriĝo de la kunlaborantoj en nia Institucio.

En la ĝenerala asembleo estis prezentita la bilanco 2002, kiu post la konvenaj klarigoj de la financa direktoro kaj la deklaro de la kont-revizoroj, estis aprobita unuanime. Aparte oni emfazis, ke la plej granda enspezo, en 2002, estis la subteno de nia Asocio en Germanio, ne nur pro la ĝenerala vivtenado, sed ankaŭ pro la akiro de nia nova traktoro kaj la brila vojaĝo al Fortaleza!



**Jen la nova traktoro**

Pritraktante la estontan labor-programon, la financa direktoro prezentis jenan proponon:

"Surbaze de la multjara sperto en Bona Espero kaj laŭ la opinioj de profesiuloj de "volontulaj servoj ĝenerale", oni venis al la konkludo ke organizaĵo kiel la nia ne povas plen-ritme kaj sekure funkciadi nur per la sporada kunlaboro de volontuloj. Plurfoje, la volontuloj, pro la fakto ne esti pagitaj, ne volas transpreni respondecojn kaj ne sindediĉas plene al la laboro, alvenante kaj forirante laŭplaĉe kaj kreante problemojn en la edukado de la infanoj.

Sekve, estas necese starigi novan sistemon, kiu povus jene funkciadi :

1) La volontuloj, kontraktitaj laŭ Registara Dekreto de 1998 ( ... ), ricevas kompenson sub formo de "repago de elspezoj" kaj plenumas labor-horaron interkonsente starigitan laŭ la necesoj de la institucio.

2) La bonesperanoj ne plenumas difinitan labor-horaron, sed kunlaboras en la orientigo de la volontuloj, indikante prioritatajn taskojn kaj kontrolante ilian plenumon.


3) La direktoroj devas garantii, kunordigi kaj kontroli la harmonian funkciadon de la Institucio.

4) Nuntempe Bona Espero havas 2 volontulojn, kiuj ricevas "repagon de elspezoj" ( Orlando kaj Adelí) sed baldaŭ ni povos kalkuli je pliaj 3 (Leslie, Jaqueline kaj Marcos).

5) La buĝeto por 5 pagitaj volontuloj estas garantiata en la financa plano 2003.

La propono estis akceptita post la jenaj klarigoj:

Adelí kaj Orlando estas eks-lernantoj, kiuj tre sindediĉe laboras en Bona Espero. Adelí kompetente kuiradas kaj krome zorgas por 4 infanoj ; Orlando plenumas diversajn taskojn en la agrikulturo, traktorado kaj prizorgado de la instalaĵoj; Leslie estas nova volontulino kiu akceptis la delikatan taskon zorgi pri 6 adoleskantoj, kiuj dum la semajno restadas en la domo de Alto Paraiso kaj vizitas la lernejon tie; la geedza paro Jaqueline kaj Marcos, post restado en Bona Espero pasintjare, decidis reveni kaj akcepti nian proponon zorgi por 12 infanoj kaj kunlabori en la ĝenerala mastrumado. [La administra direktoro Moacir kun sia edzino Gloria estas la anstataŭantoj de Ursula kaj Giuseppe kaj zorgas por 4 adolescentoj. – Adarci prizorgas 4 knabojn same kiel la lernejon kaj ricevas kiel instruistino salajron de la urbestraro. En la alfabetigado ŝi havas la kunlaboron de Gloria.]



Giuseppe, Adarci, Tota (starante)
Moacir, Jaqueline, Leslie, Mauro (sidante)

Sekve de la akcepto de tiu propono, kiu garantias la daŭran ĉeeston de minimume 8 plenkreskuloj [t.e preskaŭ la mezo estas eksbienanoj] en Bona Espero, Giuseppe kaj Ursula prezentis la jenan deklaron:

"Post 28 jaroj de volontula laboro en Bona Espero, ni ŝatus, ek de nun, prepari nian iom-post-ioman foriron lasante la respondecon al la ceteraj kunlaborantoj. Ni konscias ke la multfacetaj taskoj en nia Institucio verŝajne postulos en la tuja estonteco ankoraŭ la neceson de iu nia kunlaboro, sed tre limigita.

Tiu kunlaboro povus konsisti en la jenaj aktivecoj, se la estraro juĝos tion oportuna :

a) Surbaze de la nova Interna Regularo, Giuseppe daŭrigos zorgi pri la buĝeta planado, pri la ĝenerala librotenado, administrado de spezoj kaj koncerna dokumentaro.

b) Ursula povus respondeci pri la publikaj rilatoj, pri la kontaktoj naciaj kaj internaciaj kun staĝuloj, bonfarantoj, la subtena Asocio en Germanio kaj zorgi pri la koncerna korespondado kaj la esperantista aspekto de nia Institucio.
c) Principe kaj ĝis la fino de 2003, nia aktiveco disvolviĝos en Brasilia kun sporadaj vizitoj en Bona Espero laŭ eventualaj necesoj.

Dum la jaroj oni kreis, en la publika opinio, favoran sintenon pri nia Institucio pro la notinda eduka laboro realigita, pere de intervjuoj en gazetoj kaj televidstacioj kaj pere de personaj rilatoj. Ni aŭspicias, ke niaj posteŭloj konservos la akiritan prestiĝon de seriozeco kaj plialtigos ĝin per agadoj bazitaj en la spirito de servo al infanoj viktimoj de la socio."

La partoprenantoj de la Asembleo unuanime rekonis la rajton de Giuseppe kaj Ursula forlasi la pezajn respondecojn kaj promesis plenan kunlaboron por la estonteco de Bona Espero. "

Sekve oni asignis al la antaŭe nomitaj personoj kaj geedzoj la enloĝatajn kvar domojn en la bieno kaj la domon en la urbo. Aldone estas pluraj eksternaj gelernantoj kiuj nur partoprenas al la lecionoj en Bona Espero.
La geedzoj Grattapaglia finas la skribaĵon kun la frazo :
„ Ni firme esperas ke la nova sistemo bone funkcios kaj ke ni povos pace ripozi, post kelkaj jar(dek)oj, ĉe la Zamenhof-monumento sciante ke Bona Espero pluvivos !! "

Al tiu punkto la mallaŭta, sed signifoplena "revolucio" en Bona Espero, ĉe kio nia tuta estraro deziras al la posteŭla teamo ĉiun feliĉon, kaj kompreneble ni subtenos ilin same kiel la admirinde sukcesan geedzan paron Grattapaglia! Ni ĉiuj plenkore gratulas Ursula kaj Giuseppe pro ilia unika, epoka vivfaraĵo dum preskaŭ 30 jaroj kaj deziras al la ambaŭ ankoraŭ longan, sanan kaj kontentan (mal-?)emeritecon kun la plenumo de ĉiuj deziroj! Kaj kvankam lia laboro ankoraŭ ne finas, ni same kore diras: dankegon pro tiel longdaŭra, seninterrompa, sinoferema, malfacila laborego, kiu al centoj da infanoj ebligis dignan sukcesan vivon! - (Samtempe mi ŝatas peti pardonon ĉe Ursula pro la anticipado de ŝia 70-a naskiĝtago 2003 erare je unu jaro en la lasta rondletero.)

En la antaŭa cirkulero unuafoje kiel infano el Bona Espero „ kunlaboris " Igor, ĉifoje Orlando kiel kapabla ekslernanto de BE – sukcese ne laste pro via fidela kunhelpo por BE - skribas pri siaj spertoj kaj vivo :



**Orlando kun la edzino Susi**

„ Mi lernis kune kun miaj 4 gefratoj en la lernejo de Bona Espero en la fino de la 80aj jaroj de la 1-a ĝis la 5-a klasoj. Tiam miaj gepatroj ricevis de la ŝtato terenon en Alto Paraiso kaj ni iris loĝi tie.

Mi daŭrigis la lernejon, laboris en la ĝardeno de sinjorino Ady Costa, kiu multe kunlaboras kun Bona Espero. Kaj de 4 jaroj mi volontulas en Bona Espero en la prizorgado de la plantoj, legomejoj, fruktoarboj, mi traktoras!, kaj estas utilaj en ĉiuj necesoj.
Ĉiam estis mia sonĝo flugi per aviadilo, sed mi ĉiam pensis, ke neniam mi havus tiom da mono por flugi en la ĉielo. Sed

mirakloj okazas! Mi estis elektita inter la bonesperanoj por reprezenti BE en la Universala Kongreso kaj por mi estis revelacio paroli kun tiom da homoj el la tuta mondo kiel geamikoj. Kaj ankaŭ mi neniam banis en la oceano! Mi ĉiam ŝatis Esperanton - kaj nun mi ŝatas ankoraŭ pli.

Mi edziĝis kun Susi en la fino de marto. Ŝi lernis dum la lasta jaro en la kurso de esperanto, kiun Sergio donas en la urbo Alto Paraiso. Ŝi ankoraŭ studas en la lernejo kaj mi estas kun ŝi sabaton, dimanĉon kaj merkredon vespere. Nun ni ambaŭ volas partopreni la Nacian Kongreson en Belo Horizonte en julio.

Mi sincere dankas al la homoj en Eŭropo kiuj ebligis al mi iĝi fervora esperantisto! Kore vin salutas Orlando "

Por iomete mallongigi la ampleksan tekston mi ŝatas rezigni ĉiloke pri la redono de dua impresa letero de la sukcesa eksbonesperano Tota kaj prezentos tiun al vi kadre de la venonta rondletero.

Se vi interesiĝas pri tio: Ekzistas belega nova filmo (VHS) pri Bona Espero en Esperanto, kiun produktis brazila televidstudio. La filmo daŭras 55 minutojn kaj taŭgas ankaŭ por nia sistemo. Ni kopiis kaj vendos por 5,- euroj. Vi povas mendi ĝin ĉe ni.

Fine ankoraŭ relative marĝena noto kompare al la ampleksa gravega novaĵo: En Alto Paraíso krom la larĝega ĉefstrato Avenida Esperanto ekzistas ekde kelka tempo nun ankaŭ flanka strato, kiu nomiĝas Rua Bona Espero!


Mi ŝatas sincere danki – kiel ĉiam kiel anstataŭanto por multaj aliaj – al la geedza paro Brigitte kaj Frank Helfrich el Halver, kiu ekde pluraj jaroj invitas multajn geesperantistojn dufoje jare hejmen, modele regalas ilin kaj ĉiufoje petas pri mondonaco por niaj infanoj anstataŭ gastdonacoj. La kolekton ili mem ĉiam malavare plialtigis al impona sumo.

La sama kora danko koncernas la elementan lernejon Marienschule el Meschede, kiu ankoraŭ ekde pluraj jaroj kolektas multe da mono por Bona Espero.

Rilate al nia ĝis nun nur germanlingva preskaŭ preta retpaĝo pri Bona Espero ni planas baldaŭ aperigi la tekston esperant- kaj anglalingve.

Karaj geamikoj, as "same procedure as every year" (ĉiujare denove) mi ŝatas fini, ankaŭ nun salutante kaj dankante korege ĉiujn ĝisnunajn kaj novajn geprosperigantojn pro ilia valora subteno favore al Bona Espero ligita kun la peto pri via plia kunlaboro, ĝuste dum ĉi tiu fundamenta ŝanĝa periodo, sufiĉe malfacila por ĉiuj koncernataj tie. Ĉi tiun dankon mi same esprimas nome kaj de Ursula kaj Giuseppe kaj de la tuta estraro.

***Ĉi tiu deziras al vi ĉiuj gajan Pentekoston!***





**Ursula + Giuseppe kun bonesperanoj**